



aktuala

36-a ELDONJARO

Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com. Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

Abona membriĝo nur por adresoj en Belgujo, 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Eltiro 150 ekzempleroj.

Informoj : www.esperantobruselo.org ; aktuala.retejo.net ; br11.leadhoster.com ; ebg.skynetblogs.be ; uea.org ; paulo.retejo.net ; barelo.blogspot.com ; esperanto.net ; esperanto.be ; lernu.net ; liberafolio.org ; eo.eventeo.net

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 3 - Kotiz-tabelo kaj La Ponto de Pieter Jan Doumen
- Paĝo 4 - Poemaro, Sylla Chaves, Alberto Garcia, Kálmán Kalocsay
- Paĝo 5 - Bruselano Jacob Hasbun tradukis eseon de Borges
- Paĝo 6 - Humuraĵoj laŭ Arquillos kaj Esperantujo en Sicilujo
- Paĝo 7 - Bruselo la Nova Bjalistoko laŭ Dafydd ab Iago Fergus
- Paĝo 9 ĝis 12 - Kalendaroj Julia kaj Gregoria, Jaro 0, Bede
- Paĝo 13 - Krozanta Babelturo estas eseo de Roman Dobrzyński
- Paĝo 12 - Hubert de Meyere raportas pri Mediteranea E-Semajno
- Paĝo 17 - Fotaĵoj, agado kaj prelego en EBG, La Hirundo, Verda Stelo

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Majo 2011

- 04 Marcel Delforge prelegas pri lia Transsiberia Vojaĝo al Ulanbatora Kongreso
- 11 José Augusto Pinto de Sousa pri Tradukado en Europaj Institucioj
- 18 Eduard Kusters pri la Belga Kompromiso: ekzisto, historio, nuna situacio
- 25 Eric Baert prelegas pri lia laboro en Kongo Belga dum 1963-1967

Junio 2011

- 01 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci
- 08 Vladimira Chvatalova pri Vojaĝoj tra Benino, Togolando, Ganao kaj orfejo Nabouba
- 15 Angelos Tsirimokos pri Kalendaro kaj Origino de la Semajno
- 22 Semajna kunveno
- 29 Semajna kunveno



Esperanto-Café en Namur 25.3.2011 kaj Jara Asembleo de BEF en Loverval 26.3.2011

KOTIZ-TABELO 2011

Nro	Kodo	Kategorio kaj Kotizo	€	Rajtoj
ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO				
11	MEM	Membro de EBG	10	Abono al "Aktuala" (organo de EBG)
12	MEM-R	Membro-junulo (ĝis 26-jara)	5	+ partopreno en la vivo de la Grupo
13	MEM-S	Membro-pensiulo, senlaborulo	7	Partopreno en la vivo de la Grupo
14	FAK	Familia kunloĝanto	2	Partopreno en la vivo de la Grupo
18	DVM	Dumviva membro de EBG	250	Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo (25 X MEM kotizo)
BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ				
21	APE	"Association pour l'espéranto"	14	Membro+Abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)
22	FEL	Flandra Esperanto-Ligo (FEL)	25	Membro+Abono al "Horizontal" (grandparte nederlandlingva)
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO				
31	SA	Abonanto de "Esperanto"	38	Abono al "Esperanto", monata organo de UEA
32	Kto	Abonanto de "Kontakto"	23	Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA
33	MJ	Membro kun "Jarlibro"	25	Membreco en UEA + "Jarlibro"
34	MA	Membro-abonanto de UEA	61	MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato !
35	MG	Membro kun "Gvidlibro"	10	Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj)
36	SZ	Membro de Societo Zamenhof	122	Honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEA
37	MD	Dumviva Membro de UEA	1525	MA de UEA dum la tuta vivo! (25 X MA kotizo)

Kara membro de EBG, bonvolu pagi tuj 10€ abonkotizon 2011 al konto 000-0 123 048-52

FUNEBRA DOMO GARDATA DUM ENTERIGO

(Rouwhuis bewaakt tijdens begrafenis)
Ĉiam pli da funebrantaj familioj luas privatajn gardistojn por preventi, ke dum enterigo-ceremonio ŝtelistoj penetru en ilian domon. Ankoraŭ pasintsemajne viro estis kaptita ĉe la freŝa faro en domo en Schoten, Antverpeno. Per mortanonco en gazeto li eksciis, ke bon-hava persono estos enterigita la saman tagon. Ĉar ankaŭ la funebra adreso estis menciita, li povis senprobleme trovi riĉan rabaĵon, sed la polico preventis la ŝtelon. Diras A. D'Haese, direktoro de gardofirmao: "Ĉiam pli ofte ni estas petataj gardi la domon de funebranta familio por preventi

ŝtelon. Ni intervenas almenaŭ unufoje semajne en Antverpeno. Unu tia interveno kostas € 150. Plej ofte temas pri riĉaj familioj, kiuj dungas nin. Ni laboras en du manieroj: aŭ nia agento restadas en la domo aŭ li aŭ ŝi patrolas ekstere, bone videbla. Ni zorgas, ke estu moviĝo en aŭ ĉirkaŭ la domo, kio fortimigas ŝtelistojn. Tiel ni preventas, ke familioj, kiuj jam travivas malĝojigan periodon, havu ankoraŭ pli da mizero."

Pieter Jan Doumen, reta bulteno La Ponto n°16



POEMARO:

LA MALNOVA TRAJNO

Ĉu? Ĉe... Ĉu? Ĉe...
 Ĉu ĉemizo? Ĉu ĉevalo?
 Ĉu ĉe monto? Ĉu ĉe valo?
 Ĉu ĉerizo? Ĉu ĉe rozo?
 Ĉu ĉe koro? Ĉu ĉe maro?
 Ĉu ĉe brako? Ĉu ĉe briko?
 Ĉu ĉagreno? Ĉu ĉe greno?
 Ĉu ĉe milo? Ĉu ĉe molo?
 Ĉu ĉe bono? Ĉu ĉe mono?
 Iu... Iuuuuuuuu...
 Ĉu ĉe si?
 Ĉu ĉe ci?
 Ĉu ĉe mi?
 Ĉu ĉe vi?
 Ĉe... Ĉu? Ĉe...Ĉu?

(El "Brazilo Esperanta Parnaso")
Sylla Magalhães Chaves



ADIAŬO

Kiel disŝiriĝas l' animo mia
 kiam el via esto, mi foriras!
 pecoj el mia spirito disiras,
 restante interne de l' koro via! .

Pilgrimo en mia propra konscia
 animstato, mi serĉas -kaj deziras-
 la konsilon, per kiu, ĝi eltiras
 l' doloron de ĉiu tiu nostalgia.

Mi lasas vin kiam griza aŭroro
 naskiĝas: griza- maro; atmosfero,
 griza; ĉio estas griza koloro;

eĉ la malgajeco kaj la sufero.
 Sed la plej trista-griza amdoloro:
 esti kune kun vi, mia espero.

Alberto Garcia Orive, Julio 2010

ADIAŬO

Adiaŭ do, "Reĝino de Danubo",
 adiaŭ, vi fiere sveltaj pontoj,
 deklivo mildaj de la Buda-montoj,
 kaj Margaret-insul', kie en subo

de la klostroruinoj, kiel bubo,
 mi dolĉe tremis antaŭ amrenkontoj,
 adiaŭ al vi, urbo de la hontoj,
 urb' de hororoj, ĝema sub inkubo!

Terura urbo, kie post masakroj
 kadavrojn portas la Danubaj akvoj,
 mi nun eskapas vian sangon faŭkon,

For de ĉie tie, kie ĉio fias,
 mi trenas min, spitante la kadukon,
 al front', renkonte al la... mi ne scias

Kálmán Kalocsay, Tra la ŝtormo 1939-1945

COLLECTED POEMS AND PLAYS

de Rabindranath Tagore, 11.6.1937

Antaŭ dek tri jaroj mi havis la iomete terurigan honoron konversacii kun la respektiginda kaj nobla Rabindranato Tagore. Oni parolis pri la poezio de Bodlero. Iu deklamis « *La mort des amants* », tiun soneton tiel provizitan per litoj, divanoj, floroj, kamenoj, konzoloj, speguloj kaj anĝeloj. Tagore lin aŭskultis animforte, sed diris je la fino :

« *I don't like your furniture poet!* »

(*Mi ne ŝatas vian meblitan poeton!*).


Mi tuj profunde simpatiis kun li. Nun, relegante liajn verkojn, mi suspektas, ke tio, kio instigis lin, estis malpli hororo de romantika *bric-à-brac* ol nevenkebla ŝato de malprecizeco.

Tagore estas nekorekteble malpreciza. Ĉe liaj mil kaj unu versoj ne estas lirika streĉo kaj ankaŭ ne la plej eta vorta ŝparo. En prologo li deklaras esti « subakviĝinta en la profundecon de oceanaj formoj ». Tia figuro estas tipa ĉe Tagore, tipe fluida kaj senforma.

Mi tuj tradukos poemon. La rakonta modo protektas ĝin de troo da interjekcioj. Ĝia titolo estas :

Irante laŭ malluma vojstreko de sonĝo:

"Laŭ malluma vojstreko de sonĝo mi iris serĉante mia en antikva vivo. La domo situas funde de vojo ruiniĝinta. Ĉe la vespera aero, ŝia favorita pavo dormetas en ĝia la amon, kiu estis ringo, kaj la kolomboj silentas en ilia angulo.



Jacob Hasbun, elstara artisto, membro de EBG kaj kunlaboranto de Aktuala.

Ŝi lasis sian lanternon apud la portiko kaj venis halti antaŭ mi. Ŝi levis siajn grandajn okulojn ĝis mia vizaĝo kaj senparole demandis : ĉu vi bone fartas, amiko ? Mi volis respondi . Nia lingvo estis perdiĝinta kaj forgesita. Mi pensis kaj pensis : niaj nomoj ne troveblis en mia rememoro.

Brilis larmoj en ŝiaj okuloj. Ŝi etendis al mi sian dekstran manon. Mi ĝin prenis silente. Tremis kaj estingiĝis lanterno en la vespera aero."

Eseo de Jorge Luis Borges: Recenzoj por revuo El Hogar de Buenos Aires 1936-39
Jacob Hasbun elhispanigis

5

6

HUMURAĴOJ PRI FUMADO

Dudek el cento da homoj mortas pro fumado, do la restantaj okdek el cento mortas ne pro fumado . Tio montras ke pli ofte oni mortas ne pro fumado ol pro fumado. Ŝajne pli bone fumi ol ne fumi por ne tiom morti !?



Iu sinjoro iras al la dentisto kaj demandas al li : -Mia dentaro estas flavkolora pro fumado, kion vi rekomendas al mi ? - Mi rekomendas al vi brunan kravaton !



Doktoro diras al paciento : - Mi multe bedaŭras diri al vi ke vi ne vivos multe da tempo, do vi devos ne plu fumi, nek trinki alkoholon kaj eĉ ne plu seksumi. - Kaj, doktoro, tiel mi plu vivos ? - Tute ne, sed la tagoj ŝajnos al vi multe pli longaj...



Doktoro diras al iu paciento : - Vi, definitive, devas forgesi tabakon, alkoholon kaj noktajn amuzaĵojn. - Ĉu por ĝui bonan sanon ? - Ne, kara amiko, vi devas ŝpari monon por pagi tion kion vi ŝuldas al mi.

Angel Arquillos, Monate Ĉe Vi, N°90

ESPERANTUJO EN SICILUJO

La Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2012 okazos en la sicilia urbo Mazara del Vallo, kiu eventuale iĝos "*sidejo de la internacia Esperanto-komunumo*". Tian mirindan informon eblas legi en gazetara komuniko de la urbo. Tamen jam en januaro 2010 la estraro de UEA decidis, ke la Universala Kongreso de Esperanto okazos en Vjetnamujo. La vera stato de la aferoj estas iom alia, sed ne malpli impona. En Mazara del Vallo en 2012 okazos la itala kongreso de Esperanto, en lernejoj startos kursoj pri la lingvo, kaj la municipo senpage disponigos sidejon por fondota Esperanto-centro. Brunetto Casini rakontis pri la efektivaj planoj, iom malpli fantaziaj:

- Unu el miaj nuntempaj taskoj en la movado estas organizi la ĉiujarajn *italajn kongresojn de Esperanto*. Mi trovis taŭgan kongresejon por 2012 en Sicilujo, en la urbo Mazara del Vallo, apud flughaveno Trapani-Birgi. Mi trovis tie tre malfermitajn pordojn. Kiam mi atingis mem la urbestron, la tuja reago estis: "Jes, ni kunlaboros volonte al la sukceso de via kongreso, sed ni volas fari ion pli, ĉar ni tre konsentas kun viaj esperantaj idealoj, ekzemple igante nian urbon ia Centro de Esperanto por Italujo, aŭ eĉ por Mediteraneo."

Laŭ Libera Folio

BRUSELO: LA NOVA BJALISTOKO

Kvankam ĝi naskiĝis en Eŭropo, Esperanto ne estas eŭropa lingvo. Ĝi sukcesis iĝi vere internacia kaj tion pravas ĝia pligrandiĝo ekster Eŭropo. Tamen de jardekoj Eŭropo prezentas multajn ŝancojn por Esperanto, kiuj alie ne ekzistus.



Dafydd ab Iago Fergus

La evoluo de la Eŭropa Unio (EU) forte kreskigas etoson, kiu povus esti tre favora al Esperanto. Eble pro tio, individuaj esperantistoj bombardas anojn de la Eŭropa Parlamento per petletoj kaj longaj dokumentoj. Ili nun fieras pri 80 parlamentanoj kiuj sin diris favoraj al Esperanto. Simile en la kongresoj de UEA kaj de aliaj organizoj ĉiujare oni esperas ke la EU finfine adoptos Esperanton kiel solvon de la lingva problemo. Ankaŭ en la reto Esperanto rapide evoluas kun miloj da paĝoj kaj dokumentoj, multaj en Eŭropo. Ni nun eĉ povas aŭskulti E-elsendojn en la reto, plejparte el Eŭropo. Eble tre baldaŭ videblas la unua Esperanta ret-televideo. Sed ĉu

7
Esperanto vere estas sur la bona vojo?

Ne! Esperanto iras malantaŭen ĉar ĝi ne sukcesas venki ian ofican teritorion. Speciale ĉe la Eŭropaj organizoj en Bruselo la lingvo suferas pro tre malbona bildo (se ĝi havas iun ajn bildon). Tial poresperanta agado plej ofte estas ege kontraŭefika ... Por Eŭropaj politikuloj Esperanto restas artefarita lingvo parolata de malmultaj fanatikuloj. Ĝi simple ne valoras seriozan diskuton per Eŭropaj politikuloj kaj funkciuloj. Esperanto ne meritas diskuton, ĉar ĝi ne videblas aŭ aŭskulteblas en la Eŭropa ĉefurbo, Bruselo. Tiu fakto rekte rilatas al struktura malforteco de esperantaj organizoj.

Pro sia tutmonda devo, ekzemple, UEA devas rezigni sian Eŭropan agadon al volontuloj — t.e. al Brusela Laborgrupo pri la Lingvoproblemo en Eŭropo kaj al Eŭropa E-Unio. Tiuj volontuloj ne povas esti ĉiam profesie disponeblaj je agado ĉe politikuloj kaj ĵurnalistoj. Tamen ili laboras preskaŭ plentempe por Esperanto. Plie, tiaj nedaŭraj agadoj neniam efikos ĉar UEA restas en la malproksima Roterdamo. Ĵurnalistoj kaj eŭropaj politikuloj simple ne fidus privatulojn aŭ surpaperaĵajn organizojn sen Brusela oficejo.

Do, pro tiaj strukturaj kialoj, la E-movado malsukcesis krei Bruselan bazon por fari efikan Eŭropan politikon. Kaj ĝis nun la oficienantoj de la movado ne

8
komprenas la gravecon de la Eŭropa ĉefurbo. Ili ne komprenas kial jam de longa tempo tiom da landoj havas ambasadejojn kaj konsulejojn en Bruselo.

Ili ankaŭ ne vidas ke jam 2000 internaciaj organizoj havas oficejon en Bruselo por defendi siajn interesojn. Male, internaciaj esperantaj organizoj (UEA kaj SAT) elektis unulingvajn urbojn.

Eĉ la Flandra E-Ligo preferas unulingvan Antverpenon (kvankam pli da flandroj loĝas kaj laboras en Bruselo ol en Antverpeno). Ili ĉiuj ne vidas ke Bruselo estas tiel multlingva, kiel estis Bjalistoko. Ĉi tie nenia lingvo havas monopolon. La parolenda lingvo ĉiam dependas de kiam, de kie kaj de kiuj parolas. Eĉ belgoj estas ofte devigataj paroli aliajn lingvojn. Bruselo (la urbo kaj Eŭropaj instancoj) estas granda lingva eksperimento, en kiu ne partoprenas esperantistoj. En la plej multlingva Eŭropa urbo venas sep aŭ ok homoj al esperantaj renkontiĝoj. Neniam la malforta Brusela grupo organizos ĉi tie grandajn renkontiĝojn kaj altiros la intereson de ĵurnalistoj kaj EP-anoj.

Sed kial kunigi Esperantajn organizojn kaj parolantojn en Bruselo? Kial gravas ĉi tiu urbo?

Unue, peresperanta agado por lingva egalrajteco estos plej granda kontribuo al demokratio. Kun oficejo en Bruselo, ni povus efike kritiki ĉiujn formojn de lingva malegaleco en la EU. Ni povus klarigi (samtempe en Esperanto kaj

naciaj lingvoj) al 1000 eksterlandaj ĵurnalistoj en Bruselo la kostojn kaj malavantaĝojn de la angla-franca lingva monopolo. Ni kritikus (ankaŭ en Esperanto kaj naciaj lingvoj) la lingvajn malegalrajtecojn, kiujn alfrontos estontaj EU-membroj kaj alfrontas malgrandaj nacioj ĉie en la mondo. La profito de tia agado estos mondskala profesia bildo por Esperanto en amaskomunikiloj. Same kiel agado per Amnesty International kaj Greenpeace, esperanta agado estus valorega por la tuta mondo.

Due, nur en la multlingva Bruselo, kun 40% da eksterlandanoj, eblas konstrui lokon, kie oni daŭre parolas internacie. En tiu konstruado ludu gravan rolon la dek homoj kiuj, danke al esperantaj organizoj en Roterdamo kaj Parizo, nun povas sin vivteni per esperanta laboro. Tia materia kaj socia bazeto allogus esperantistojn por kongresi, por plifortigi siajn lingvajn konojn, kaj simple por resti en daŭra esperanta etoso. Ĝi ankaŭ donus ŝancojn al junuloj akiri spertojn kiel volontuloj en internaciaj esperantaj organizoj.

Trie, esperantaj organizoj uzu iom da — ege malgranda — ekonomia povo de esperantistoj. Kial pagi tiom dum niaj kongresoj al neesperantaj hoteloj, junulargastejoj, restoracioj, trinkejoj? Kial ni ne sukcesas recikli iom da tiaj malgrandaj profitoj en nian movadon? Kial ne

KALENDAROJ JULIA KAJ GREGORIA

La Julia kalendaro estis nomita laŭ la nomo de la romia imperiestro Julio Cezaro kaj la Gregoria kalendaro estis nomita laŭ la nomo de la romkatolika papo Gregorio XIII.

La Julia kalendaro estis la ĉefa kalendaro de Romio kaj de la Okcidento de 45 a.K. ĝis la 16-a jarcento. Ĝi estis la antikva romia kalendaro kiel reformita de Julio Cezaro. En 1582 la julia kalendaro laŭvice estis reformita de papo Gregorio la 13-a por fari la gregorian kalendaron, la nuna ĉefa kalendaro de la mondo. La 1-a de januaro 2000 laŭ la gregoria kalendaro estis la 19-a de decembro 1999 laŭ la julia. Antikvaj Romianoj estis unuaj, kiuj transiris al Suna kalendaro. Ilia jaro konsistis el 10 monatoj kun 304 tagoj. La restan tempon Romianoj atendadis ĝis veno de printempo por ke denove komenci tempokalkulon. La Novjaro komenciĝadis en Marto. Dum longa tempo kalendaro tiel konfuziĝis ke ĝi sekvis nek sunan movon, nek lunan. Kiel oni diris, Romiaj militestroj ĉiam venkadis en militoj, sed neniu sciis kiam tio okazadis. Kaj jen, en la 1-a jarcento a.K. Romana ŝtatestro Julio Cezaro laŭ konsiloj de egipta astronomo Sozigeno enkondukis novan tempokalkulan sistemon. Tio okazis en 45 jaro a.K., laŭ kio jarkomenco fariĝis la 1-a de januaro. Ĉi tiu kalendaro estis pli

perfekta. Ĝi estis dividita je 365 tagoj kaj 12 monatoj simile al egipta kalendaro, sed estis unu grava diferenco: ĉiun kvaran jaron oni aldonadis la 366-an tagon. Oni nomis tiajn jarojn superjaroj. Per tio ĝia averaĝa daŭro alproksimiĝis al natura jaro kaj kalendaro fariĝis pli stabila kaj konforma al naturo. Ĉi tiu kalendaro estis nomita Julia kalendaro. Post la morto de Julio Cezaro en 44 a.K. oni erare faris superjaron en ĉiu tria jaro anstataŭ en ĉiu kvara jaro. Poste oni konstatis la eraron kaj korektis ĝin, farante neniun superjaron dum iom da tempo antaŭ ol daŭrigi kun superjaro en ĉiu kvara jaro. Bedaŭrinde mankas rekta informo pri la precizaj jaroj, kiuj estis superjaroj, inter 44 a.K. kaj 8 p.K.. Tamen, laŭ papiruso publikigita en 1999 oni povas dedukti, plej verŝajne la uzitaj superjaroj. Kvankam se oni en romia kunteksto uzas daton inter 44 a.K. kaj 1 a.K., estas bone precizigi, ĉu oni uzas la hodiaŭan julian kalendaron aŭ la tiaman julian kalendaron. En aliaj kuntekstoj oni ĝenerale uzas la hodiaŭan julian kalendaron, sed kelkfoje oni estas pli certa pri la tiama dato. Ekzemple, Julio Cezaro mortis la 15-an de marto laŭ la tiama julia kalendaro; verŝajne tio estis la 14-a de marto laŭ la hodiaŭa julia kalendaro. Ĝis 527, la julia kalendaro sekvis la romian eraon, sed poste la kristanan eraon. **La Gregoria kalendaro** estas nuntempe la plej vaste uzata

kalendaro en la mondo. Ĝi estis unue proponita de kalabria kuracisto Aloysius Lilius kaj oficiale adoptita de la papo Gregorio la 13-a, laŭ kiu ĝi estis nomita. La kalendaro estis oficiale enkondukita la 24-an de februaro 1582 pere de papa deklaro *Inter gravissimas*. Ĝi estas reformita Julia kalendaro. Jaroj en la reformita kalendaro aldone plu nombriĝas laŭ la sistemo de julia kalendaro, kiu tradicie nombras ilin ekde la supozita nasko de Jesuo Kristo, tiun jaron oni nomas "annus Domini" (AD) aŭ nia (nova) erao (n.A), kaj foje estas nomata kiel "komuna erao" (KE), foje ankaŭ nomata "Kristana Erao". La ŝanĝoj, kiujn faris Gregorio, korektis la drivon de la civila kalendaro, kiu aperis pro tio, ke meza julia-kalendara jaro (ekzakte 365,25 tagoj) estis iom tro longa, kio kaŭzis tion, ke la tago, kiam oni festis Paskon, drivis malrapide kompare al la civila kalendaro. La Gregoria kalendara sistemo ellasis 10 tagojn por denove sinkronigi la kalendaron al la tera orbito kaj teni ĝin sinkrona laŭ la jena regulo de superjaro: Ĉiu jaro, kiu divideblas per 4 sen resto, estas superjaro, escepte de la jaroj, kiuj senreste divideblas per 100, sed ne per 400. Ekzemple la jaro 1900 ne estis superjaro, sed la jaro 2000 estis tia. Tamen laŭ la julia kalendaro ĉiuj jaroj, kiuj senreste divideblas per 4, estis superjaroj.

Laŭ Vikipedio kaj prelego de
Angelos Tsirimokos en EBG

doni ŝancojn al kelkaj personoj labori en Esperanto?

Certe iam Esperantaj organizoj komprenos ke neniam eblos fari Eŭropan politikon el Roterdamo aŭ Parizo. Sed kiam?

Kaj, ĉu estus pli efike krei novan kaj vere Eŭropan organizon, kiu tuj profesie agos? Aŭ estus pli bone batali kontraŭ inerteo kaj nescio en ekzistantaj esperantaj organizoj, ĝis ili finfine transloĝiĝos al la nova Bjalistoko, kiu estas Bruselo?

La Ondo de Esperanto. 2000. №6 (68)
Redaktis Dafydd ab Iago Fergus
publikigis Herman Deceuninck,
dumviva membro de EBG

ESPERANTAJ SINONIMOJ:

ekvilibro = egalpezo, stabileco, balanco

engaĝi = aligi, altiri, kontraktigi

enorma = grandega, ega, giganta

erari = devojigi, erarvagi, miskalkuli, misdiri, misskribi

esplori = ekzameni, sondi, studi, revizii, kontroli

establi = fondi, organizi, aranĝi, instalii, starigi, krei

estimi = honori, ŝati, respekti, adori

estingi = sufoki, forblovi, forviŝi, ĉesigi

estro = ĉefo, superulo, gvidanto, direktoro, mastro

estrado = podio, scenejo, tribunuo



Czesław Baranowski, Pola Esperantisto

PRI KALENDARO GREGORIA

Nia nuna kalendaro, la gregoria, kiu anstataŭis la kalendaro julia kreita de la imperiestro Julio Cezaro, sekvas la sunon, ne la lunon, tiel ke la komenco de printempo estas fiksita je la 21-a de marto. Februaro kutime havas 28 tagojn, sed en la superjaro ĝi havas 29 tagojn. Do, en la jaroj 1992, 1996, 2000 kaj 1600 ĝi havis 29 tagojn, sed en la jaroj 1993, 1994, 1900 kaj 1700 ĝi havis 28 tagojn. En la julia kalendaro, kontraste, februaro havis 29 tagojn en la jaroj 1900 kaj 1700. Pro tio, la meza gregoria jaro havas 365,2425 suntagojn, dum la julia havas 365,2500. La suna jaro mem estas 365,24219878 suntagoj. La gregoria jaro estas 25,96 sekundojn tro longa (kio fariĝos unu tago post 3320 jaroj). Aldone al la cikloj de monatoj kaj jaroj, estas la ciklo de la semajnoj. La semajno havas sep tagojn.

[Vikipedio](#)

JARO 0

La kalendaro ne havas jaron 0. Oni foje supozas, ke ne estas jaro 0 en la gregoria kalendaro ĉar ĝi komenciĝis antaŭ la kreo de numero 0. Sed la franca respublika kalendaro komenciĝis post la invento de 0, kaj ankaŭ ĝi ne havis jaron 0. La fakto estas ke jaroj havas ordajn numerojn. Tio signifas ke jaro *x* estas la *x*-a jaro. La jaro 1 estis la unua jaro de la

[Vikipedio](#)

kristana erao, kaj la jaro 1 a.K. estis la unua (nu, fakte la lasta) jaro de la antaŭkrista epoko. Simile, la jaro I de la respublika kalendaro estis la unua jaro de la Franca Revolucio; la jaro II estis la dua, k.t.p. Tial ne estis jaro 0. Por la samaj kialoj ne estas 0-a monato, nek 0-a tago en monato. Ĉar ne ekzistas 0a jaro (nek 0-a io ajn, krom en komputiko aŭ astroscienco), ne estis jaro 0. Tamen, ekzistas almenaŭ du esceptoj de la supra aserto:

- La orienta versio de la budhisma kronologio. Tiu kronologio komencas per la supozata mortojaro de la Budho. En la okcidenta versio (de Barato, Sri-Lanko kaj Birmo), tiu jaro estas jaro 1, kaj la jaro 2500 korespondas al la jaro 1956-1957 laŭ la okcidenta kronologio. Sed en la orienta versio (de Tajlando, Laoso kaj Kamboĝo), la komenca jaro fakte estas jaro 0, kaj la jubilea jaro 2500 do estis festata en 1957-1958.

- La internacia normo pri datreprezentado, ISO 8601. Tiu normo ne numeras la jarojn laŭ la kristana erao, anstataŭe la jaro 1875 estas difinata kiel la jaro de la subskribo de la "Convention du Mètre" (Konvencio de la Metro) en Parizo. Aliaj jaroj estas nombrataj rilate al 1875, do la gregoria jaro 1 A.K., laŭ ISO 8601 estas la jaro 0.

BEDE

Bede, estis anglosaksa sanktulo, monaĥo kaj verkisto, kiu popularigis la uzo de la datoj laŭ la Kristana Erao. Li naskiĝis en la jaro 672 kaj mortis en la jaro 735, estas entombigita en la katedralo de Durham, Britujo. Lia *Historia Ecclesiastica Gentis Anglorum* (*Eklezia Historio de la Angla Popolo*) estas tre grava fonto por la historio de la anglosaksa epoko. Angle li estas ofte nomata *The Venerable Bede* (*La honorinda Bede*). Li estas konsiderata "la patro de angla historio". Li naskiĝis en Northumbria, proskime al la moderna Newcastle-upon-Tyne, kaj eble devenis de nobela familio. Kiam li havis sep jarojn li eniris la monaĥejon ĉe Wearmouth por esti edukata. Verŝajne en 682 li translokiĝis al la kunigita monaĥejo ĉe Jarrow, fondita tiun jaron. En 686 erupciis pesto en la monaĥejo kaj nur du el la postvivantaj monaĥoj scipovis kanti antifonojn: unu estis dek-kvar-jara knabo, eble Bede. Ĉirkaŭ 692 li iĝis diakono, kaj en 702, pastro. Ĉe Jarrow li estis kaj verkisto kaj instruisto. Li havis reputacion de lerta kantanto kaj flua laŭtleganto de anglosaksa poezio. En 708 ebriemaj monaĥoj de Hexham akuzis lin pro herezo, ĉar lia libro *De Temporibus* (*Pri Kronologio*) proponis mondan kronologion malsaman ol tiu ĝenerale akceptata de teologoj. La episkopo Wilfrid ĉeestis la festenon dum kiu oni faris la

akuzon, kaj ne respondis, sed Bede defendis sin per letero. Bede korespondis kun multaj ekleziuloj kaj eminentuloj, kaj verŝajne multe vojaĝis tra Anglio. En 734 li planis viziti Ecgbert, episkopon de Jorko, sed tro malsanis. Li verkadis librojn ĝis sia morto, kaj eĉ verkis poemon sur sia mortlito. Li mortis en 735 kaj entombiĝis en la monaĥejo de Jarrow. Verŝajne dum la 11-a jarcento liaj restaĵoj estis relokataj en la katedralo de Durham. En 1541 la tombo estis rabata, sed liaj ostoj reentombiĝis en la katedralo. Li estas honorita kiel sanktulo ekde la anglosaksa epoko. Lia festtago estas la 25-an de majo. Pri verkoj de Bede, de 701 ĝis sia morto li verkis pli ol sesdek libroj. Pluraj estis lernolibroj. Ili traktis sciencajn, gramatikajn, literaturajn, teologiajn kaj historiajn temojn. Tamen estas pro lia *Historia Ecclesiastica Gentis Anglorum* ke li estis plej konata. Tiu historio, finita en 731, priskribas la historion de Anglio de la invado de Julio Cezaro al la tempo de Bede mem, kaj aparte traktas la konvertadon de la anglosaksaj regnoj al kristanismo kaj la posta historio de la anglosaksa eklezio. Bede zorge petis informojn por sia *Historio* de aliaj, kaj konsultis kopiojn de multaj originalaj dokumentoj. Li verkis ankaŭ biografiojn de la abatoj de Wearmouth kaj Jarrow, kaj de Sankta Cuthbert.

[Vikipedio](#)

AKCEPTADO DE KALENDARO

Nia nuna gregoria kalendaro estas suna kalendaro, sekvas la sunon, sed ne la lunon. Kvankam la monatoj historie devenas de luna periodo, la monatoj komenciĝas kun la nova luno nur tute hazarde. Kontraste, la islama sekvas la lunon, ne la sunon, kaj la hebrea kalendaro la sunon kaj la lunon.

La gregoria kalendaro estis aprobita kaj ekuzata en diversaj landoj en malsamaj tempoj:

- 1582 – Portugalio, Hispanio, Italio, Francio, Luksemburgio, Pollando, katolika Nederlando inkluzivita nuna Belgio
- 1583 – Bavario, Tirolo
- 1583–1585 – Katolika Germanio kaj Svislando
- 1584 – Aŭstrio, Ĉeĥio
- 1587 – Hungario
- 1590 – Transilvanio
- 1610 – Prusio
- 1700 – Danio, Norvegio, kaj la protestantaj regionoj de Germanio, Nederlando kaj Svislando (escepte de Sankt Gallen)
- 1724 – la svisa kantono Sankt Gallen
- 1752 – Anglio kaj kolonioj (ekzemple la nuna Usono)
- 1753 – Svedio, Finnlando
- 1873 – Japanio (la dekreto de aprobo estis malpreciza je superjaro, poste estis precizigata je 11-a de majo 1898 laŭ la gregoria kalendaro)
- 1911 – Ĉinio
- 1912 – Albanio
- 1915 – Litovio
- 1916 – Bulgario
- 1918 – Rusio, Estonio
- 1919 – Rumanio, Serbio
- 1924 – Grekio
- 1926 – Turkio
- 1928 – Egiptio

KROZANTA BABELTURO

Siatempe en Panamo mirigis min multetaĝa domego, kiu ŝoviĝis tra la plata tereno, simile al la monto transportata per la forto de kredo. Fakte tio estis turisma ŝipo en la Panama Kanalo. Ĝi anoncis novan koncepton de turismo, nome la krozadon sur varmaj maroj ligitan kun vizitado de survojaj mirindaĵoj. Mi mem ekdeziris sperti tiuspecan kombinon de ripozo kun perceptado de la mondo. Tiu ĉi revo realiĝis danke al “Esperantotur”.

En la flughaveno de Parizo al Santiago de Chile al la pola dekopo aliĝis la rumana esperantistino Rodica Todor, parenteze prezidanto de IFEF – Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. La dutaga vizito al la ĉilia ĉefurbo sufiĉis por aklimatizi al la sudamerika somero kaj horaro. Transportitaj al la haveno de Valparaiso, ni devis alten direkti la rigardon por vidi la nomon de la giganta ŝipo *Star Princess* kaj ĝian flagon de Bermudoj, kie la ŝipo estas oficiale registrita. Ĝi apartenas al la supernacia kompanio *Cruises Princess*. Nia *Star*, kiun ni baptis *Verda*, estas giganta ŝipo de 109 mil tunoj. Ĝi povas transporti 2600 pasaĝerojn kaj 1200 membrojn de la laborpersonaro.

La ŝipo longas 280 metrojn. Oni povas ĉirkaŭiri ĝin laŭ la sepa “promenferdeko”, enspirante la jodhavan aeron. En la sama etaĝo troviĝas kvar luksaj restoracioj, kie

oni servas vespermanĝojn ĉiam en eleganta stilo kaj je fiksita horaro.



Roman Dobrzyński

La plej vizitata estas la 14-a ferdeko kun multaj bufedaj restoracioj kaj memservaj manĝejoj. Ili funkcias ekde frumateno ĝis noktomezo. Eblas tie manĝi kiam ajn kaj kiom ajn, ĝuante varian menuon. Tamen necesas aparte pagi alkoholaĵojn. Mono ne estas uzata. Enirante la ŝipon, oni deponas minimume 300 usonajn dolarojn kaj ricevas kreditkarton, per kiu oni kovras ĉiujn krompagojn.

Sur la 14-a ferdeko troviĝas ankaŭ du naĝejoj kaj pluraj rondaj kuvoj por ĝui akvomasaĝon. Ambaŭ naĝejojn ĉirkaŭas multaj faldseĝoj por kuŝado. Oni preferas uzi la 15-an “sunferdekon”, por brunigi sian haŭton. La 16-a nomiĝas “sportferdeko”. Ĝi ofertas komfortajn lokojn por gimnastiko kaj ludoj, krome maŝinojn por

fizika ekzercado. Unu etaĝon pli alte estas saŭno, masaĝejo, salonoj por fizika kaj aliaj terapioj. Ne forgesante la medicinan centron en la 4-a ferdeko, oni rajtas nomi la ŝipon surmara sanatorio.

Tiom pri la korpaj bezonoj. Kaj la spiritaj? Ĉiuvespere okazas spektakloj en la teatro kun 1500 lokoj; la kinejo prezentas kelkajn filmojn dum unu tago, preskaŭ senĉese oni povas aŭskulti diversajn specojn de muziko. Aparte ŝatata estis ĉiutaga tangodancado fare de la argentina paro Fernando kaj Cecilia. Fanatikuloj de telenoveloj povis rigardi ilin en siaj ĉambroj pere de satelita televido, kiu cetere ofertis amason da aliaj programoj. La ŝiptelevido senĉese transdonis aktualajn informojn pri la krozado kaj prezentis ĉiujn vizititajn kaj vizitotajn lokojn. Ekskursoj montriĝis eble la plej grava aspekto de la turisma krozado.

La 26-an de januaro 2011 vespere nia ŝipo forlasis Valparaison kaj direktis sin suden preter la orienta bordo de Ĉilio. La sekva tago pasis sur trankvila Pacifiko, sub la forta suno kaj varma tamen ĉiam pli ventema aero. Scivolemuloj esploris la internon de la ŝipo kaj sentis admiron al la italoj, kiuj ĝin konstruis. Aparte ravas la interna trafiksystemo. Ĉiun ferdekon oni povas rapide atingi per multnombraj liftoj, kvankam mi preferis grimpi laŭ la vastaj ŝtuparoj, por bruligi superflujajn kaloriojn.

La 29-an de januaro 2011 frumatene la pasaĝeroj amase invadis la suprajn ferdekojn de la ŝipo, ankrita en profunda fjordo, por admiri la majestan glaĉeron *Amelia*, kies klifa frunto etendiĝas vertikale je cent metroj super la marnivelon. La ŝipo daŭrigis sian fjordan itineron inter la altaj montoj neĝkovritaj kaj eniris la Magelan-Markolon. Ĝi haltis eksterhavene kaj la pasaĝeroj spertis aventuron transportiĝi en ŝalupoj al la plej suda ĉilia urbo Punta-Arenas, kiu estis elirpunkto de ekskursado al diversaj lokoj de la subantarktika regiono. La plej atrakcia celo montriĝis kolonio de pingvenoj, ĉiam amuze scivolemaj. La sekva etapo estis Kanalo Beagle kaj Ushuaia, la ekstreme suda urbo de la terglobo, la "mondofino". Sed la ŝipo veturis ankoraŭ pli suden kaj ĉirkaŭiris la faman Horn-Promontoron. Tiamaniere dum kvar tagoj ni trifoje trapasis lokojn, en kiuj tuŝas sin Pacifiko kaj Atlantiko. Tiuj solaj naturvojoj inter ambaŭ oceanoj havas gravan strategian signifon kaj kaŭzis plurfoje militajn konfliktojn, kiuj latente plu ekzistas. Plidanĝerigas ilin la problemo de Falklanda-Malvina arkipelago, kiun posedas Britujo, sed ties proprietulo konsideras sin Argentino. Feliĉe nia vizito ne kaŭzis militon, kvankam pasaĝeroj de nia ŝipo, kiuj "invadis" la insularon, estis pli multaj ol ĉiuj ĝiaj loĝantoj. La atlantika etapo de la vojaĝo daŭris ses tagojn, plej longe en la plena maro, trankvila kaj suna.



Roman Dobrzyński bierumas inter polaj esperantistoj 30.6.2009 en Olštino, Pollando

La 9-an de februaro ni atingis havenon de Rio-de-Ĵaneiro, vizitinte pli frue Bonaeron kaj Montevideon. Tra Rio, prepariĝanta al la karnavalo, kompetente gvidis nin la esperantistino Rosana Carames. La neesperantista parto de nia grupo havis okazon konfirmi la konatan onidiron: "Per la angla oni interkompreniĝas, sed per Esperanto oni krome amikiĝas." Nia ŝipo vere similas la Babelturon. Mi parolis kun multaj pasaĝeroj kaj ŝipanoj. Laŭ mia provizora kalkulo ili reprezentis proksimume 40 landojn kaj pli multajn lingvojn. La oficiala lingvo estis la angla, sed en la praktiko samrange funkciis la hispana. Cetere la plimulto de la servistaro devenis el Latin-Ameriko kaj la alian grandan grupon formis orienteŭropanoj, aparte ukrainanoj, kun kiuj ni povis interkompreniĝi pole aŭ ruse. Ŝajnas al mi, ke tiu ĉi "babela" etoso kaj komfortaj vivkondiĉoj de la ŝipo perfekte taŭgas por Esperantaj-aranĝoj, kiuj samtempe plenumus propagandan rolon rilate al aliaj pasaĝeroj kaj ŝipanoj, prezentante la modelan solvon de la lingva problemo.

Roman Dobrzyński, Marto 2011, Pollando

15

16

MEDITERANEA E-SEMAJNO

Okazis ek de la 26-an de februaro ĝis la 5-an de marto 2011 en la komforta hotelo "Le Renouveau" Agay - Francio - Lazura Marbordo.



Hubert kaj Michèle De Meyere-Villers

Programo

Eblis sekvi kursojn en tri niveloj : la 1a, por komencantoj gvidis la slovako Stano Marček ; la 2a, por parolantoj gvidis la ĉeĥo Marek Blahus ; la 3a, dediĉita al diskutoj, kaj analisoj de noveloj gvidis la kroatino Spomenka Ŝtimek. Posttagmeze, ĉiu povis mem elekti programon: promenado, piedirado en montaro Esterel, familia vivo ĝis la vespero. Vespere okazis prelegoj kaj distraĵoj.

Niaj celoj

Ni havis tri celojn: unua plibonigi nian esperantan nivelon ; dua revidi konatajn amikojn kaj fari novajn; tria iomete vakancigi en bela regiono. Ni delonge spertis ke sekvi kursojn ne sufiĉas por flue paroli . Oni nepre devas praktiki la lingvon kaj labori. Ek de la pasinta jaro, ni malkovris ke prepari prelegon estas agrabla kaj tre efika labormaniero.

Kursoj

Ni elektis la duan nivelon kiun brile gvidis talenta juna ĉeĥa instruisto. Marek estas nur dudekkvar-aĝa kaj jam elmontras grandan sperton ne nur pri la lingvo, sed ankaŭ por paroligi la lernantojn. Li intence uzis komputilon por ĉiam vive ilustrati la temojn, kaj respondi al la demandoj. Ni same grunde revidis la gramatikon. Ĉio ege plaĉis al ni. Ni aŭdis ke la partoprenantoj ankaŭ ŝatis la nivelojn unu kaj tri.

Prelegoj

Dum la du unuaj vesperoj, ni prezentis niajn prelegojn pri : Belgujo, lando de historio, arto, scienco kaj folkloro. (Geedzoj Hubert&Michèle De Meyere-Villers). La titolo de nia prelego bone rezumas la enhavon. Ni jam prezentis ĝin dum la 18a semajno de turismo kaj kulturo en Katalunujo (Coma Ruga) en oktobro 2010. En novembro 2010, EBG (Esperantista Brusela Grupo) invitis nin prezenti ĝin denove en Bruselo. Ĉiu foje, ni spontane ricevis proponojn por plibonigi la prelegon ne nur lingve sed ankaŭ historie. Ni ŝatas danki ĉi tiujn samideanojn por lia helpo kaj intereso : Nikolao de Buyl kaj Angelo Tsirimokos (EBG), Andreo Grossmann, Remy Bouchet, la geedzoj Gabalda (Francujo), kaj membroj de nia Esperantista grupo de Marcinelo (Belgujo). Por la prezento en AGAY, ni aldonis ĉapitrojn : pri folkloro (Binĉa karnavalo) kaj pri arto (la belga

pentristo James Ensor). Ni ĉiam komencis la prelegon per la belega kanto de Jacques Brel: "La Plata lando". Ni elektis tiun kanton, ĉar ni opinias, ke ĝi estas unu el la plej belaj pri Belgujo, kaj pli precize pri Flandrujo. Ankaŭ ĉar Brel estas emblema brusela civitano, kiu fieris pri sia « belgeco ». La binĉa karnavalo estas unu el la plej antikvaj kaj reprezentivaj de Valonujo. Ĝia fama Ĵilo « Gille » fascinas homojn tra la tuta mondo. James Ensor (1860 – 1949), superregis la belgan pentraĵon de sia epoko. Originala figuro, li komencis pentri sub la influo de Manet kaj Degas kaj de la simbolistoj. Li trapasis duonon jarcenton de pentrado de la naturalismo al la ekspresionismo kaj superrealismo preterpasante impresionismo, simbolismo, kaj faŭvismo. Oni ne povas asocii lian nomon kun senduba piktoriala stilo; li transcendas ĉiujn. Kiam li malfrue famiĝis, oni nomis lin « princo de la pentristoj ». Paradoksala reago : li forlasis la pentradon kaj dediĉis siajn lastajn jarojn al la muziko. Ĉar ni ne estas specialistoj pri pentrado, kaj verŝajne multaj partoprenantoj ankaŭ ne estas, ni informiĝis pri la diversaj piktorialaj stiloj kiujn Ensor travivis : realismo, naturalismo, impresionismo, makulismo, ekspresionismo, faŭvismo, simbolismo, superrealismo. Pri ĉiu stilo ni elektis taŭgajn pentristojn kaj verkojn. Dum tri aliaj vesperoj

okazis prelegoj pri : a) renkonto kun « flor-homoj » (Indonezio), (Jean-François Cousineau); b) UK Kubo 2010, (Gilles Wallez kaj J-Claude Roget); c) Maya kulturo kaj kalendaro : (Philippe Chavignon).

Ekskurso

Dum merkreda duontaga ekskurso, ni vizitis la faman urbon Grasse, monde konata pri ĝiaj parfumoj.

Distraĵoj

Ĉiuj postagmezoj estis liberaj sed oni rajtis partopreni programon de la hotelo. Dimanĉe posttagmeze okazis florifesto en AGAY. Post vespermanĝo okazis ĉiu tage distraj programoj aŭ prelegoj. La unuan sabaton ni konatiĝis inter partoprenantoj, kaj ĝuis muzikajn ludojn.

Adiaŭa vespero

Vendredon okazis adiaŭa vespero kaj oni ankaŭ teatrumis, kaj eĉ dancis. La okdek partoprenantoj sciigis sian ege pozitivan opinion pri la semajno. Oni dankis kaj gratulis la georganizantojn per agrablaj vortoj kaj floroj.

Raportis Hubert kaj Michèle De Meyere-Villers



Agado de EBG je la 16an kaj la 23an de Februaro



Fotaĵoj de la redaktoro de Aktuala prelegante pri la "Eŭropaj Institucioj laŭ la Traktato de Lisbono" je la 16an de Februaro en Bruselo, je la 28an de Februaro en Tienen kaj je la 18an de Marto en Antverpeno

LAURENT LOISSE



Kunanimiganto de EBG kunvenoj